Heinrich Heine,

# [Ne scias mi, kio okazis]

*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

*El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".*

Ne scias mi, kio okazis
al mia tristema kor':
Antikva legendo min kaptis,
ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
murmuras kiel mister',
la supron ŝtonegan orumas
sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas
mirinda sur la montet'
kaj ŝia oraĵo radias, [4]
ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon
abundan per ora kombil',
kantante misteran lidon, [5]
ravantan kiel sunbril'.

Ŝipisto en sia ŝipeto
kaptiĝas per stranga dolor',
la rifon li tute ignoras.
atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondoj englutas [6]
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
kaj kulpa pri tio nur estas
kantado de la virin'.

...

Heinrich Heine,

# Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur';
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine
Ŝipisto kun sia boat',
Kaj tion kaŭzis feine
La Loreleja kantad'.

...

Heinrich Heine,

# Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte brilas
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,
lin kaptas ve' de ekzalt'.
Li ja la rifojn ne vidas',
li vidas nur supren sen halt'.

Mi kredas, ke ondoj tiras
la ŝipon funden de l' Rejn';
kaj tio de l' kant' eliras
de Lorelaj-siren'.

...

[4] En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia"'. Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

[5] En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

[6] Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER *(∗1860-08-21 – †1950-12-31).*

*Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abscbnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo* `http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller`, *kun foto de li.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LEOPOLD ELB *(†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* HANS-GEORG KAISER *(Cezar, ∗1954-05-21).*

*Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)*